# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 24/03/2022 Kvincentsepdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*
*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 759,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **295,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **189,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **169,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



la esperanta retradio 19 mar 2022



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

KIAL SALMOJ KRESKAS MALPLI

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**Numero 7 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kie oni normale lokigas adjekton kaj kie ne malofte kaj kie nur kelkfoje?

2). Kiu frazparto de la aktiva voĉo mankas en la mediala voĉo?

3). Kie staras en Esperanta propozicio la prepozicio? Kaj donu ekzemplon kie en la angla lingvo la prepozicio ne staras antaŭ la substantivo.

4). Ĉu la nombro (singularo aŭ pluralo) kaj la kazo (nominativo aŭ akuzativo) de relativa pronomo samas al tiuj de la antecedenta substantivo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 575. *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo




La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 19a de marto estis la tria sabato Sed la vetero malboniĝis kaj John ne povis ĉeesti, ankaŭ Chris suferis pro rompita osto en la maldektra mano kaj ne povis veni kaj Roger ne volis sole iri
*Roger Springer*

## Usona ŝtatvicsekretario agnoskas ke ekzistas biologiaj militlaboratorioj en Ukrainio

[US undersecretary of state acknowledges there are biological warfare labs in Ukraine - **World Socialist Web Site** (wsws.org)] (elektu el 28 lingvoj, sed ne Esperanto)



*https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html*





_kaj por la historio de la situacio

https://www.greanvillepost.com/ https://sputniknews.com/

indian world news *Roger Springer*



Pri **Mi estis profesia soldato.** Vidu AE574

La foto en AE574 estis foto de *Max Wearing* ne *Gordon Coleman*

Mi pardonpetas. Mi fuŝis (maljuniĝas) kaj jen estas foto de Gordon Coleman.

*Roger Springer*

## Re: artikolo pri Gordon Colman Vidu AE574

Min fascinas la vigla defendo de Gordon Coleman pri servado en la armeo . Estas konsola scii ke Gordon tenas tiajn altajn idealojn. Oni esperas ke ĉiuj soldatoj kunhavas tiujn idealojn kun li. Brava ankaŭ, estas ke li havas tiel fortan vivvokon. Li uzas la malnovan diraĵon, ke soldatoj defendas ankaŭ la pacifistojn.

Por ni, kiuj tenas pacifistajn idealojn, la situacio estas pli larĝa afero ol Gordon prezentas: la forigo de konflikto, kaj la kaŭzoj de milito. Tia laboro daŭras kviete ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi estas delikata areo, kiu ne povas sin turni al publikeco se ĝi volas esti efika.

Nuligi la nedireblajn suferantajn militkaŭzojn estas certe la vojo. La Unua Mondmilito neniam estus okazinta se ne estus pro la miopa avideco de la homa specio. La dua Mondmilito ne okazus se traktatoj post la Unua Mondomilito estus pli justaj. Ni scias, ke la Korea, Vjetnama kaj Iraka militoj ĉiuj nenecesas. La sola bona afero pri la nuna sensenca milito en Ukrainio estas, ke la okcidenta mondo respondas ne per militforto sed per severaj sankcioj. Milita respondo nur kaŭzus plian kaj longedaŭran sangoverŝadon.

Alia grava laboro por pacifistoj estas kontraŭbatali la neracian malamon kiu kreskigas militspiriton, specon de amaspsikozo. Tiel la graveco de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj tiaj internaciaj instancoj



Tamen mi laŭdas Gordon Coleman pro lia klarigo de vidpunkto ne ofte prezentita.

*Charles Stevenson.*




https://titaniclifeboatacademy.org/images/videolibrary/ukraine_on_fire%20(540p).mp4

Ĉu vi spektis? Estas tre informiga filmo




trovis *R Springer*

## Pri **Mi estis profesia soldato.** Vidu AE574

Mi kun granda intereso tralegis la artikolon de nia estimata amiko kaj esperantisto, Gordon Coleman. Sciante ke tiuj, kiuj imagas, ke ili regas tiujn, kiuj laboras kaj pagas al la regantoj iliajn salajrojn, fakte, la regantoj elprenas tiom, kiom ili volas, el la poŝoj de la laborantoj, estas neniu surprizo ke ili ankaŭ senhonte devigas la laboristojn eliri kaj mortigi kiom eble plej multajn el la laboristoj kondiĉe ke tiuj loĝas en alia lando. Samlandanoj rajtas vivi, sed eksterlandanoj kompreneble ne havas tiun rajton.

Iu bonega viro eĉ tre bone komprenis tion. Li decidis ŝanĝi tion por ke la mondo kiom eble plej rapide fariĝu perfekta por la evoluado de ni tiel nomataj homoj. Li bonege komprenis, ke unu el la problemoj estas tiu, ke la homoj ankoraŭ ne komprenas unu la aliajn. Alia problemo estas ja, ke la regantoj evidente tute ne volas, ke iam ni komprenu unu la aliajn. Tial ili metas limojn inter la multaj diversaj ŝtatoj kaj mortigas tiujn, kiuj trairos la limojn sen pasportoj. Tiom ofte, kiom ili povas, unu el tiuj tro multaj ŝtatoj atakas alian ŝtaton, plej verŝajne por krei laboron por la multaj senlaboruloj en ĉiuj ŝtatoj.

La plej normalaj laboristoj en ĉiuj ŝtatoj sekvas sian konsciencon kaj, ĉar neniu loĝanto en iu ajn alia ŝtato iam ofendis lin, ne batis lin, nek ŝtelis monon de li, aŭ ion ajn nerekomendata, do li simple sekvas sian konsciencon kaj faras la ĝustan, la plej bonan, kion li povas. Li simple rifuzas aliĝi al armeo, kiu faras nenion bonan, sed simple aldonas al la tro multa malbono, kiu okazas en la mondo. Nu, bone, ĉu ne? Sed se la registaro estas kruela, ĝi sendas tiun bonegulon al labortendaro, kie li devas resti du jarojn kaj suferi, ĉar li rifuzas adori la malbonajn ideojn de Hitler, kiu ŝajnas esti reenkarnita hodiaŭ en homoj kiel Putin. Mi do ne rekomendas, ke iu ajn sekvu la ideojn, fakte sekvu neniun ideon de mortigemulo. Ni, la homoj de la mondo, ne fieras pro la krimoj, kiujn soldatoj faras. Ni ne plu bezonas krimojn, se ni iam bezonis ilin. Kion la mondo bezonas estas honestaj kaj bonkoraj homoj, kiuj amas unu la aliajn, helpas unu la aliajn kaj ĉiuj parolas unu kaj la saman lingvon. Kaj neniu prudentulo bezonas limojn inter la homoj. Mi rekomendas, ke ni ĉiuj ĉesu adori Hitler, pardonu, Putin, provu serĉu lian nomon en la vortaro kaj vidu, kion ĝi signifas! Se vi volas adori iun ajn, tiam adoru nian majstron, Lazaro, Ludoviko Zamenhof. Lia celo estis krei mondon sen limoj, kaj li donacis al ni ĉiuj facile lerneblan lingvon. Soldatojn ni ne bezonas. Ni ne plu estas danĝeraj rabobestoj, nun ni estas amoplenaj homoj. Se ne, ni provu fariĝi tiaj! Ĉu ne?




Salutas vin ĉiujn via amiko *Bob Felby*

## KIU VOJO ATENDAS NIN?



La fakto, ke estas ĉefvojo al la infero, sed nur ŝtuparo al la (dia) ĉielo, klarigas multe pri la anticipitaj trafiko-nombroj :)😊 *Vera Payne*





# Reago al la artikolo de Gordon Coleman en AE 574

Mi plurfoje atente legis la artikolon de Gordon Coleman, en kiu li laŭdas la kuraĝon de la soldatoj, kiuj protektas la edzinojn kaj infanojn de la pacifistoj, kiuj ne kapablas tion fari.

Mi ĉiam komprenis la iniciaton de Doktoro Zamenhof , kiel provon eviti militon per interkompreniĝo dank' al komuna lingvo Esperanto kaj penegas akordigi ambaŭ ideojn .

Ĉu ni devas daŭre kredi la romanan sloganon : se vi volas pacon , preparu militon?

Se homoj superas la ceteron de la estaĵoj pro sia kapablo uzi sian cerbon, imagopovon, ĉu tio ne devus konduki al la arto kompromisi, trovi interkonsenton?

Tiu, kiu estas konvinkita ke perforto estas la ĝusta respondo, eĉ ne pensas pri aliaj metodoj . Tiu, kiu posedas armilojn, kompreneble uzos ilin, iam , kun la sekvo ke la venkito serĉos oportunon por sin venĝi, sen antaŭa vido de ebla ĉeso de tiu terura ĉeno . Tiu sinteno alportas nur detruon fizikan kaj mensan kaj elĉerpas la naturajn resursojn .

Mi preferas esti la naivulo, kiu kredas pri la potenco de interhelpo. Se en bazaj kaj mezaj lernejoj, la studobjekto "historio" tro ofte konsistas en listo de bataloj ,kies datoj necesas parkerigi- almenaŭ tiel estis antaŭ longa tempo, kiam mi sidis sur la benkoj de tiuj lernejoj- ne mankas en la homa historio ekzemploj de tio, kio estas atingebla por la komuna bono per kunlaboro .



La bunteco de sintenoj, impulsoj , se ili povas esti libere esprimitaj , ebligas ke unu ekvilibrigas alian.

*Franciska Toubale*

# HAVENA PONTO EN SIDNEJO 90-JARA





Miaj gepatroj venigis min al la malferma ceriomono de sidneja ponto. Kvankam mi estis nur sep monata bebo kaj ne memoras iom pri tiu honoro, mi ĉiam fieras pri tiu sperto. Mi ankoraŭ loĝas en Sidnejo kaj uzis kaj uzos tiun ponton. Amike *Roger Springer*

# Sesa sesio de la C1-kurso 5a de feb 2022




Estis mia bonŝanco, ke oni petis min gvidi klason de azianoj (sed fakte partoprenas ankaŭ eŭropanoj kaj unu aŭstraliano). Pli ol ok landoj estas reprezentataj, kaj estas vera plezuro sperti la vere internacian econ de nia lingvo. *Trevor Steele*



# El Brizbano



Kafoklaĉo de BES ,dum kiu ni diskutis ĉiutagajn temojn, okazis je la 10a de marto.



Eble la plej interese estis ke nia amiko Paŭlo revenis ĵus antaŭ kelkaj tagoj el Francio kaj rakontis kelkajn spertojn pri sia tempo tie, inkluzive la ricevon de la viruso. Amike *Doug Eising*

# Port Arthur

La Port Arthur-masakro de 28-29 aprilo 1996 estis amaspafado en kiu 35 homoj estis mortigitaj kaj 23 pafvunditaj en Port Arthur, Tasmanio. La murdinto, Martin Bryant, deklaris sin kulpa kaj ricevis 35 dumvivajn enkarcerigojn sen ebleco de liberigo. Fundamentaj ŝanĝoj de pafilkontrolleĝoj ene de Aŭstralio sekvis la okazaĵon.



La registaro aĉetis pafilojn for de la popolo, faris leĝon - ne estas leĝe posedi pafilon sen permesilo-, akiron de la permesilo mafaciligis, kreis sekuran landon.

**Ĉu la nuna vendo de armiloj al Ukrainujo, ktp, estas kontraŭ la moralo de Aŭstralio?**

*Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1), Normale: Ĉe la fino de la propozicio.
Ne malofte: Kiel komenco.
Malofte: Ie ajn inter frazpartoj.
2). La subjekto. ("La vetero ŝanĝiĝis" kaj "La ŝtono sur la marbordo laviĝis"").
3). En Esperanto: ĉiam antaŭ substantivo.
En la angla eblas: *"The ship they travelled on"}.*
4). Samas ĉiam la nombro. Nenecese malsamas la kazo.

*Marcel Leereveld.*



**3ZZZ** … La elsendo de la 21a de marto 2022 raportas pri diversaj movadaj eventoj kaj dediĉas la ceteron de la tempo al Novzelando

*Franciska Toubale*